# NOVA ĴLETERO

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep

Nr. 2 - Oktober 1983

Ver. Uitg.:

Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B-8000 Brugge

Tel. 050/33.00.04

## Editorialo

Ĝen la dua numero de nia grupa revueto. Ĝi ne similas al la unua numero kaj eble la tria numero ankaŭ estos malsimila. Tio dependos de la reagoj kaj proponoj de la legantaro kaj kompreneble ankaŭ de teknikaj limigoj. Mi estas certa ke post kelkaj monatoj de eksperimentoj ni trovos taŭgan fasonadon.

RR

## Somero 1983:

## Vojaĝo al orientblokaj landoj kaj al la 68-a U.K. en Budapest

Post zorga preparado, ni forvojaĝis la 19-an de julio. Finfine, ĉar ŝajnis al mi ke ni jam sufiĉe elspezis (i.a. vizoj, kongres-kotizo...) sen travivi ion ! Ni (t.e. mia edzo Mark kaj mi) vojaĝis per Ford Transit, el kiu ni mem sorĉis luksan loĝveturilon, tra Nederlando, F.R. Germanujo al G.D.R. kie ni vizitis Potsdam (velkita Versailles), Halle, Erfurt, Weimar kaj la belegan Dresden.

Tra la Saksa Svislando kaj la Ĉeĥa Paradizo, ni atingis Praha, la oran urbon, vizitinda ! Kvankam la tuta urbo nun estas metro-konstruejo, ĝi restas sublima; ĉiu dom(eg)o estas juvelo. Nur unu negativa afero, kio nenie en Eŭropo stariĝis tiel forte: centoj da kaŝmonŝanĝistoj ĝenas vin kiel muŝoj. La pli sudokcidenta parto de CS estas alloga, pro siaj belegaj vilaĝoj (kiel Telĉ) kaj la vere vizitindaj kasteloj laŭlonge de la landlimo kun Aŭstrio kaj Hungario.

Post nur kelkaj kilometroj en Hungario, ni povis jam sperti ke tiu lando toleras privatajn iniciativojn. La vigleco de la loĝantaro, la reklamoj kaj la komercaĵoj sufiĉe diversaj, estigas akran kontraston kun G.D.R. kaj CS ! La bela Danubgenua pejzaĝo iĝas "Hungara Riviero" ! Tie estas daŭre konstruataj la ferivilaoj de multaj hungaroj.

Ni sekvis plue la Danubon kaj atingis tiel Budapest kaj la kampadejon. Kontraŭ vere malalta prezo oni povas tie kampadi, inkluzive naĝi (3 naĝejoj) kaj sporti; sur la kampadejo troviĝas butikoj kaj trinkejoj. Kaj Budapest mem ? Ĝi ne sukcesis imponi min kiel ekz. Praha, ĝi ne estas komparebla kun alia urbo sed ĝi estas agrabla pro la serena Buda kaj la plena Pest kaj pro la vivemaj hungaroj. Ni spertis ke la hungara kulinara arto estus komparebla kun la franca. Ĝi forgesas la francajn fanfaronaĵetojn, estas ĉiam akompanata de dampitaj sonoj de ciganmuziko kaj ĝi ne ruinigas vin !

Eblas vivi en Hungario kiel reĝo eĉ per modesta buĝeto ! La publika trafiko ekz. estas ege malmultekosta: 1,20 BF por unu vetur(ad)o. Kia diferenco kun Wien: 45 BF por unu metrobileto ! Kaj per metroo ni atingis la kongresejon, ekstere kaj interne nete ornamitan per i.a. esperantaj reklamtukoj. (Ankaŭ en la urbo pendis E-flagoj.)

Mark ne partoprenis la kongreson sed pasumis laùlonge de la Danubo kaj faris skizetojn de intima urbo. Mi, kiel "serioza kongresanino", ĉeestis la plej gravan parton de la kongreso: la "Solena Inaùguro". Ĝi komenciĝis esperdone per bela muzikpeco, interpretita de orkesteto, kiu tuj poste malaperis (?!), sekvis la mallerta prezentado de la gepodianoj — ... je mia dekstra mano vi vidas..., je mia dekstra, pardono, maldekstra..., sinjoro, pardonu, doktoro, profesoro, direktoro, advokato... — kaj inaùgura alparolo de Gr. Maertens. Poste, muzika paùzo: dum nekonata melodio sonis tra la laùtparolilој, foriris parto de la cetere granda publiko. Poste prelegis la moŝta gastparolanto, sinjoro Boutler (Sekretario de la Internacia Telegrafa Unio) en la <u>angla</u> pri la kongrestemo: "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" dum <u>duona horo</u> ! Oni disdonis la esperantan tradukon al preskaù ĉiu ĉeestanto. La publiko restis malentuziasma kaj, grandskale, dua parto foriris. Mi eltenis ĝis la malflua prezentado de ambasadoroj k.t.p. el diversaj landoj...

Mi vere havis bonajn intencojn por aktive partopreni. Mi vizitis diversajn kunsidojn sed ĉie konstatis: ege malgrandan ĉeeston - spite 5.000 kongresanoj - kaj daùre en- kaj elirantajn scivolemulojn. Mi demandas min kian sencon, kian efikon havas Esperanto-Kongreso ? La tago de la lernejo iĝis ege interesa, la balon kaj la nacian vesperon vizitis amaso. Teatraj biletoj estis elĉerpitaj sed ne ĉiuj estis kontentaj pri la prezentadoj. Ŝajnigis ke la hungaroj scias organizi sed kion vi pensas pri la egaleca kaj neùtraleca principoj de la E-movado se vi scias ke en tiu kongreso staris du standoj kie oni povis aĉeti nur kontraù okcidentaj devizoj ?

U.K. Budapest: 5.000 "kongresanoj", inter ili pli da gejunuloj ol iam (pozitiva afero); novaj estraroj de UEA kaj aliaj asocioj elektitaj; kongresa temo por eble 50 interesitoj serioze traktita; moŝtoj kaj pseùdaj moŝtoj vagis de akcepto al akcepto; daùre idediskutadoj inter orientaj kaj okcidentaj amikoj; laboro por estraranoj, eksterlanda ferio por polaj krokodiloj.

La 68-a U.K. ne povis embarasi min sed mi ĝuis miajn rendevuojn kun miaj orientblokaj amikoj. Sed kiomfoje oni pagas vojaĝ- kaj kongreskostojn por renkonti amikojn per Esperanto ?

Oliva

Pola Vizito

En la unu numero vi jam povis legi ke 4 poloj vizitos nin komence de novembro. Pri la programo ankoraù ne alvenis informoj. Ni ankaù devas konsideri la eblecon ke ili tute ne venos al Belgio pro la situacio en Pollando. Tamen, ni esperu ke ili jes venos. Ĉiuj Esperantistoj de nia regiono estos bonvenaj en De Wandelinghe je la 1-an de novembro. (Sed, por esti certa, vi telefonu kelkajn tagojn antaùe al iu estrarano !)

Ankoraù estas serĉataj loĝigantoj (unu nokto).

Kunvenoj

La estraro fiksis la grupkunvenojn je la 1a kaj 3a jaŭdoj de la monato, je la 8a vespere, en De Wandelinghe, Baron Ruzettelaan 110, 8320 Brugge 4 (Steenbrugge). Principe ne estos kunvenoj je festotagoj. Antaŭ la kunvenoj estos ebleco por tralegi la plej novajn E-revuojn.

La 3an de novembro vi povos aŭskulti raportojn pri la vizito al Aylesford kaj la FLEJA-renkontiĝo en Wavre. La 17an Oliva prezentos diapozitivojn pri Islando.

Biblioteko

Por ke ĝi estu pli bone konsultebla, ni intencas transloĝigi la grupan bibliotekon al la nova kunvenejo. Tial ni serĉas libroŝrankon ŝloseblan (se eble kun vitraj pordoj) en moderna stilo (pina ligno).

Ĉu iu havas tian meblon je favora prezo aŭ uzopruntе ?

Gazeteltondaĵoj

Certe en gazeto aŭ revuo vi kelkfoje vidas artikolon pri Esperanto aŭ lingvaj problemoj. En la estonteco, vi ne nur legu, sed ankaŭ eltondu kaj menciu daton kaj nomon de la gazeto. André Ruysschaert ege interesiĝas pri tio ! (Adreso: Ganzestraat 66, 8000 Brugge)

Radio Polonia

La Pola Radio, kiu elsendas ses fojojn tage en Esperanto, sendis al la grupo leteron por instigi nin aŭskulti tiujn programojn. Pliaj detaloj troviĝos en la venonta numero.

Ĉu estas membroj kiuj regule aŭskultas mallongondajn radiostaciojn aŭ kiuj interesiĝas pri tiaj elsendoj ?

RR

Lastmomenta kaj fina komuniko

Vi jam scias ke okazos Esperanto-Balo en Berchem-Antwerpen je la 5a de novembro. Por rapidaj mendontoj ni disponas pri kelkaj sidlokoj en aŭto veturanta al tiu balo.

Tranokto surloke eblos je simbola prezo.